

Eugen Roth,
Der Zahnarzt

Nicht immer sind bequeme Stühle
Ein Ruheplatz für die Gefühle.
Wir saßen lieber in den Nesseln
Als auf den wohlbekanntem Sesseln,
Vor denen, sauber und vernickelt,
Der Zahnarzt seine Kunst entwickelt.
Er lächelt ganz empörend herzlos
Und sagt, es sei fast beinahe schmerzlos.
Doch leider, unterhalb der Plombe,
Stößt er auf eine Katakombe,
Die, wie er mit dem Häkchen spürt,
In unbekannte Tiefen führt.
Behaglich schnurrend mit dem Rädchen
Dringt vor er bis zum Nervenfädchen.
Jetzt zeige, Mensch, den Seelenadel!
Der Zahnarzt prüft die feine Nadel,
Mit der er dir alsbald beweist,
Daß du voll Schmerz im Innern seist.
Du aber hast ihm zu beweisen,
Daß du im Äußern fest wie Eisen.
Nachdem ihr dieses euch bewiesen,
Geht er daran, den Zahn zu schließen.
Hat er sein Werk mit Gold bekrönt,
Sind mit der Welt wir neu versöhnt
Und zeigen, noch im Aug' die Träne,
Ihr furchtlos wiederum die Zähne,
Die wir – ein Prahlhans, wer's verschweigt –
Dem Zahnarzt zitternd nur gezeigt.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas EUGEN ROTH (*1895-01-24 – †1976-04-28).*

Arg-513-1008 (2010-02-18 14:46:08)

Eugen Roth,
La dentkuracisto

tradukita de Manfred Retzlaff

Ne ĉiuj molaj seĝoj estas
sidejoj plaĉaj, kie restas
volonte ni; precipe tiuj
konataj seĝoj, antaŭ kiuj
la dento-kuracist' praktikas
kaj sian arton artifikas.
Ridete diras li sen koro:
,Ja estos preskaŭ sen doloro!
Sed, bedaŭrinde, sub la plombo
puŝiĝas li al katakombo.
Per la hoketo en la fundo
laboras li en la dent-grundo.²
Kaj per borilo li sen ĝeno
penetras ĝis la nerv-fadeno.
Nun montru, hom', anim-grandecon!
Ĉar li kontrolas la taŭgecon
de l' pinglo, kiun li nun prenas
por pruvi, ke doloro-plenas
interne vi; sed vi ekstere
restadu firma, kvazaŭ fere.
Se ambaŭ vi nun pruvus tion,
ekfermas la dentisto ĉion.
Nun kronas sian verkon li
per or', rekonsoliĝas ni
kaj montras niajn dentojn ree
kun larm' ankoraŭ, sed senvee.
Fanfaronul' silentas pri
la timo, kiun sentis li.

*Traduko de la Germana poemo "Der Zahnarzt" de EUGEN ROTH (*1895-01-24 – †1976-04-28) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-513-1012 (2010-02-19 09:52:07)

²aŭ:

Kontrolas li la dentan fundon
eĉ atingante ties grundon.